BARCELONA ESPERANTO - CENTRO
CARRERAS I CANDI n-ro 34-36
Telefono. 240 25 62
BARCELONO, Katalunio, Hispanujo
JUNULARA SEKCIO DE BEC

# ĜENERALA INFORMILO

N-ro 69 SEPTEMBRO 1990

## JUBILEA EVENTO

**50a Hispana Kongreso de Esperanto en Sant Cugat del Valles**

RESUME:

- Aliĝis 240 gekongresanoj.
- Honora Prezidanto, Sinjora Mosto Jordi Pujol, Prezidanto de la Generalitat de Katalunio.
- Pli da 20 kulturaj prelegoj kaj kunvenoj okazis.
- La plej altnivela prelego. Garcia Lorca, fare de s-ro Miguel Fernandez.
- La plej altnivela koncerto de kanto. Soprano Melle Ludmila kaj ĉe piano Joan Manau.
- La plej emocia.Omaĝo al Petro Nuez kaj Fernandez Jurado.

Nome de la L.K.K. kaj de la HEF-estraro,ricevu ĉiuj kongresanoj,koran dankon.

Vicprezidanto de la L.K.K.

---

## EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE BARCELONA ESPERANTO-CENTRO

Tagon 26an de septembro, sidejo Carreras Candi 34-36, Barcelono,de la 20a ĝis la 21a horo.

### TAGORDO

a. Informo pri la 50a Hispana Kongreso de Esperanto
b. Kampanjo. ESPERANTO-LIBRO EN ĈIU BIBLIOTEKO
c. INSTRUADO KAJ INFORMADO PER VIDEO.
ĉ. 78a Universala Kongreso de Esperanto en VALENCIO (1993)
d. Subvencioj.Donacoj.
e. EĤOJ de la verko ESPERANTO EN PROSPEKTIVO
f. Eldonado de NOVA VORTARO hispana-esperanta

Cele prepari la eksterordinaran kunvenon,ĉiumerkrede je la sama horo okazos kunveno en nia sidejo ,pritraktonte la menciitaj temojn.

BEC-estraro restos tre dankema al la menbroj,kiuj estas pretaj ĉeesti kaj partopreni en la debatoj kaj kunvenoj.

BEC-Sekretario
Josep Conesa

---

**NOVAJ KURSOJ KOMENCIĜOS LA TAGOJN 4an kaj 5an de septembro**

## OMAĜO AL SAMIDEANOJ PETRO NUEZ KAJ R. FERNANDEZ JURADO

La 50a Hispana Kongreso de Esperanto jam okazis en Sant Cugat del Valles, kaj sendube ĝi restos en nia koro, kiel unu el la plej agrablaj, interesaj kaj pozitivaj eventoj. Por ĉiu ĉeestanto, ĉiujare ekzistas parto de la kongresprogramo, kiun li memoras por ĉiam. Laŭ opinio de la subskribinto, tiu ero estis la omaĝo al samideanoj Petro Nuez kaj Ramon Fernandez Jurado, danke al kies entuziasma kunlaborado estis ebla la restarigo de la Esperanto-movado en Sant Cugat, post nia interciviitana milito.

Kiam momentoj antaŭ la komenco de tiu omaĝo, ĉe la tralego de la kongreslibro mi rimarkis, ke ne aliĝis al tiu evento iuj Esperanto-Grupoj, en kiuj ambaŭ samideanoj instruis la lingvon; kaj rigardante la salonon de la kongresejo ni konstatis, ke eĉ ne ĉeestas reprezentantoj de tiuj Esperanto-Grupoj, kiuj, se nun ekzistas, tion oni devas danki al la iama helpo kaj kunlaboro de la omaĝotoj, kaj krome, observante, ke mankas inter la publiko eĉ tiuj Esperantistoj kiuj ĉiam fiere diris: " Mi lernis Esperanton per la lernolibro de Petro Nuez", la fama "Curso Elemental de Esperanto", tuj mi demandis min: Kial ili ne estas kun ni hodiaŭ? Ĉu ĉar ili estas okupataj; aŭ, ĉu ili ne kuraĝas montri sin en la kongreso, aŭ ĉu ĉar la verko de Petro Nuez, estas verkita en la kastilia kaj ne en la kataluna lingvo, aŭ ĉar la granda Esperantismo de niaj omaĝotoj ne superis la personajn opiniojn politikajn de la Esperantistoj.

Jus komenciĝinte la omaĝado, s-ano Giordano Moja, alparolis la ĉeestantojn, kaj ....... ekis unu el la plej emociaj festoj de nia kongreso. La parolanto priskribis la agadon de niaj omaĝatoj, -ankaŭ aparte menciante tiujn de la karmemoraj s-anoj Ramón Molera kaj Luiso Mimo Espinalt-, rakontis intimajn detalojn el ilia vivo, nome, ke ambaŭ Petro kaj Ramon, eĉ tre malsanaj, tamen instruis nian Internacian Lingvon en diversaj kluboj; por ili la Esperanto-instruado estis prioritata afero, la precipa kaj plej grava tasko kiel esperantistoj. Invite de la subskribinto, aldiris emociplenajn vortojn memore de la du amikoj forpasintaj, gesamideanoj Trinidad Garcia, Antonio Alonso Kaj V. Hernandez. Profunda silento regis en la salono; la tempo haltis. kaj eĉ la suno, kiel timida diino, akompanis nin sendante siajn lumradiojn sur la kvinpintan verdan stelon de la granda standarto, kiu prezidis en la salono.

Post la paroladoj, centoj da koroj batis, la okuloj komencis malsekiĝi, kaj ĉiuj koroj skuiĝis, kvazaŭ elektra fulmo tuŝus ilin. Sekve, centoj da manoj daŭre aplaŭdis, kaj tondra sono longe plenigis la grandan salonon, kaj la kongreson, kaj la kongresurbon, kaj Esperantujon, ĉar ne estas la manoj kiuj aplaŭdis, leganto, estas niaj koroj kiuj emociitaj ĉirkaŭbrakis unu kun la aliaj.

Kiam fine fariĝis silento, oni petis al la gefamilianoj de la du omaĝitoj, ke ili proksimigu sin al la podio, por ricevi bukedon da floroj, kiu prenis s-ino Angels, nome de la gefamilianoj de Petro Nue , kiuj ne ĉeestis pro malsano; kaj nome de R. Fernandez Jurado, lia vidvino. Manpremoj, kisoj kaj larmoj fermis tiun omaĝon.

Salvador Aragaj
Komitatano de UEA